2-a Jaro - N° 6 — Januaro 1947 BULLETIN INTÉRIEUR Prezo : 6 fr. frankoj

Anarkisto estas senŝtatano aŭ ne estas anarkisto

# SENŜTATANO

Monata Informilo de la
PROVIZORA KOMITATO DE LA JUNUL-ANARKISTA INTERNACIO

Vi pensu per via propra cerbo kaj se vi eraros. nu, estos viaj kaj ne alies eraroj.
LANTI

REDAKTEJO KAJ ADMINISTREJO : E. VIVANCOS
1, rue Fontaine-au-Roi, PARIS (11e) - Francio

KASISTO : Albert GRILLAT, 24, rue Grange-aux-Belles, Paris-10e (Francio)
Poŝtĉekkonto . . . . . . . . . . . . . . . C. C. P. 2.082-31 Paris

JARABONO (10 NUMEROJ) :
Franclando. . . . . . . . . . . . . . 60 fr. frankoj
Aliaj landoj : 70 fr. frankoj aŭ 7 respondkuponoj

## KIEN NI IRAS ?

LA tuta homaro povas konstati, ke la lastokazinta milito ne helpis plibonigi la mondon. Male, malgraŭ la detruo de la nazi-socialismo, la mondo ankoraŭ nun aspektas mizera. Dum la milito, kiam la faŝistaj armeoj estis okupantaj la plejmulton da landoj el Eŭropo, ni aŭdis flustri: « Post kiam la demokrataj popoloj estos venkintaj la militon, ni konstruos pli belan, pli bonan mondon ».

Ni ĉiuj scias la rezultaton de la milito kaj tiu, kiu ne ignoras la hodiaŭan situacion, devas konfesi. ke se ne okazos ia miraklo, ni baldaŭ denove povas travivi masakron. Ĉu ni tiam postvivos ĝin estas tre dubebla temo. Estas strange, ke ĉiuj registaroj pretekstas esti pacaspirantaj, sed spite tion, ili plifortigas la armeojn kaj ne fidas unu la alian. Precipe en Eŭropo ni vidas belan spektaklon. En diversaj landoj ja estas socialistaj registaroj kaj... vi mem scias la respondon. Antaŭ tiuj t. n. socialistaj registaroj ne sukcesis krei la tre necesan harmonion.

Ili ne povas kaj ne povos, ĉar ili ne reprezentas la socialismon, sed la ŝtatojn kapitalismajn. En la praktiko, ili ne regas, sed nur plenumas la taskojn, kiujn la posedantoj komsiis al ili. Antaŭe la kapitalistoj. helpataj de la t. n. socialistaj gvidistoj — ĉar ni ne forgesu, ke ili ne penadis malebligi ĝin — sukcesis okazigi militon. Nun, kiam la socia vivo estas malordigita, la socialistaj gvidistoj estas tiom ĝentilaj klopodi eltiri la kapitalismon el tiu ĉi embaraso. Ili penadas reformi la mondon, nevolante elimini la kaŭzon de la universala mizero, la kapitalisman strukturon de nia socio. La esencoj de la diversaj politikaj partioj egalas. Ĉiu partio aspiras la ŝtatpotencon. La ŝtato estas la moderna idolo de l'homaro. Se iu mortigas proksimulon, tiokokaze li estas murdisto, sed se la ŝtato ordonas mortigi — ekzemple dum milito — li estas heroo. Estas la ŝtatistoj, kiuj faras la limojn kaj kiuj deklaras militon. La popoloj obeas tiujn strebulojn kaj mortigas unu la alian profite al la kapitalismo. Per ĉia demagogio kaj mistifikaĵo, la gvidistoj trompadas siajn sekvantarojn. Antaŭ la milito ni aŭdis, ke la faŝismo estas la lasta fazo de l' kapitalismo. Nun la naci-socialismo en Germanio estas neniigita, sed la kapitalismo ? Ĉu ĝi estas forigita ? Eĉ infano povas konstati tiun ĉi pens-eraron. Sed malgraŭ tia mistifikaĵo, la gvidistoj daŭrigas la propagandon. Ili parolas pri la Kara Patrio ktp.

La edukon al vere socialisma kunvivado ili neglektas. Aŭ pli bone, ili ne povas eduki tiel, ĉar ili mem ne kredas al liberecana socialismo. Ili adoras la aŭtoritatan metodon. Ili opinias, ke la homaro bezonas la aŭtoritatan vivmanieron kaj ne povas apliki la liberecon. Ho ne, ne penu pri liberecon, ĉar tio estas danĝera, ke la mondo povu funkcii sen ilia perado, ili ne kredas aŭ ne volas kredi. La plej grava malfacilaĵo estas, ke ĝis hodiaŭ ili sukcesis kredigi tion al plej granda kvanto de la homaro.

Ni, Esperantistoj, pruvas, ke ni kapablas amike interrilati teranoj, kiuj hazarde naskiĝas sur alia loko de nia planedo. Tio estas eble aŭ tre verŝajne la kaŭzo ke la ŝtatistoj ne atentas la progreson de Esperanto. Do estas nia propra tasko konvinki la homaron pri la utileco de nia kara lingvo. La problemon pri kien ni iros, ni mem povas influi per nia agado. La popoloj ne deziras militon. nur sole la ŝtatistoj devigos ilin intermiliti. Ni nepre penadu malebligi tion, Kamaradoj, semante antaŭen !

ADRIANO

## El travivaĵoj de Esperantisto

Antaŭ ĉio, por esti Esperantisto, oni nepre devas lerni Esperanton...

Ian tagon — tio okazis kiel kutime, ĝuste dum varma sunhela tago — sur la stratoj de unu urbo (la privataj nomoj ja ne estas interesaj), mi rimarkis grupon de eksterlandanoj. Ilian fremdlandecon mi tralegis sur iliaj vizaĝoj: la Ĉino, laŭ mia kompetenta opinio aspektas iom aliel ol Galiciano... Kaj en la grupo mi rimarkis eĉ Anglojn, kiujn mi distingis ne laŭ pipoj, sed laŭ... pantalonoj (« knickerbockers », kiuj estis jam novaĵo en Eŭropo). Ili ĉiuj portis verdajn steletojn sur la brusto. Pro manko de brusto (libera de ornamoj), kelkaj portis la stelon sur la brako.

— Sinjor' — mi demandis al unu el ili — sinjoro, pardonu, kio okazas ? Kion deziras la ĉinoj en mezo de Eŭropo ?

Tiu, kiun mi alparolis, estis Vienano. Mi sciis tion precize, ĉar li estis ...mia konatulo, Vienano, kiel multaj aliaj, el... Bojberiko, en Galicio. Nun li verŝajne promenas sur Rotŝilda bulvardo en Tel-Aviv.

— Okazas — respondis tiu — Esperanto-kongreso : jen lingvo internacia, facile ellernebla, servas por ĉiuj rasoj, klasoj kaj popolamasoj... Venu viziti nian kunvenon vespere...

Mi venis, vidis kaj oni min venkis: Ili parolis senperan lingvon; ĉiuj parolis, ĉiuj komprenis kaj eĉ mi ekkomprenis la esencan sencon de iliaj paroloj. Kaj de tiam en tramveturilo kaj en vagonaro, eĉ sur mia biciklo, mi studadis ĉi tiun strangan lingvon, dum tutaj... du semajnoj. Vortoj envenis mian cerbon (jen pruvo, ke ĝi ekzistas!) kaj fiksiĝis en ĝi. En la koro (jen denove pruvo) fiksiĝis la Ideo. Mi komencis interkorespondi kun eksterlandanoj (ne por Esperantistoj ekzistas landlimoj). El Rusio, Polio, Francio, Kanado venis ĉarmaj leteroj, belegaj poŝtkartoj. Eĉ el Jerusalemo. Skribis ankaŭ samideanoj el Hispanio kaj el Portugalio. La lastaj tute simple invitis min veni en ilian landon. Kaj mi venis. De sur la ŝipa ferdeko mi ekvidis — ho Dio granda! — flagon, grandiozan standardon, tute verdan — kun kvinradia stelo — sur la fono de nigrovizaĝa portugala publiko: brunaj junuloj kun nigregaj harbukloj, kun pelerinoj sur la ŝultroj. Dum tiam mia vivperiodo mi estis konvinkita kontraŭ-alkoholulo. Sed mia abstinenco ne povis kontraŭstari la inviton de miaj novaj jam amikoj, veni en la « Esperanto-renkontejon » por ion drinki. Tra palmaj bulvardoj ili gvidis miajn tremantajn korpon kaj animon tra Avenuo de la Libero

(Daŭrigo sur la 2-a paĝo)



*Atentu, junulo ! La militarismo preparas novan buĉadon.*

El Bulgario

## Ĉu kalumnioj ?

En la 9-10-a numero (1946) de nia bulgara esp. gazeto « Internacia Kulturo », organo de bulgara esperantistaro. la redaktistaro respondas al la korespondaĵo pri la situacio en nia lando, refutante ĝin. En la artikolo oni parolas, ke la korespondaĵo estas nur kalumnioj pri Bulgario kaj la Laborista Partio (komunistoj).

Nun sekvas la demandoj :

Kiu kalumnias kaj mensogas ?

Kiu diras la veron pri nia lando ?

Ĉu la sinjoroj ĉirkaŭ « Internacia Kulturo » aŭ la aŭtoro de la korespondaĵo pasinta kaj nuna ?

En la artikolo oni diras, ke la unua kalumnio estas, ke nia lando estis liberigita de anglo-amerikaj kaj sovetaj armeoj. Ĉu tio ne estis tiel ? Kvankam anglo-amerikaj soldatoj ne surpaŝis nian landonteritorion, tamen tio okazis, ĉar tiel estis interkonsentintaj la unuiĝintoj. Alifianke, la faŝisma reĝimo ĉe ni falis nur pro tio, ke la anglo amerikaj soldatoj antaŭenpaŝis suden kaj la rusa armeo estis ĉe nia norda landlimo. Jen pro kio ni diras, ke la unuiĝintoj liberigis nin aŭ, pli ĝuste, faligis la porgermanan reĝimon ĉe ni. Ĉi tie ni parolas nur pri eksteraj kaŭzoj.

Oni skribas tre longe pri la komercaj rilatoj de nia lando kun okcidentaj kaj nordaj landoj Kion ni ricevis kaj kiome ? Plej bone scias tion nia popolo kaj kiuj prenas de tio, kion estas elportinta eksterlanden, tion scias plej bone la anoj de la Laborista Partio (Kom.). Do, la registaraj faktoroj konas plej bone nian komercan situacion kaj ne la sinjoroj ĉirkaŭ « Internacia Kulturo ».

Pri la liberigo de nia popolo kaj tiu de la Laborista Partio (Kom.), oni diras, ke ni ree kalumnias. *Sed oni nur diras;* nenian fakton oni donas kontraŭ la "kalumnioj" de la korespondaĵo. Tamen nun mi devas aldoni faktojn, kiuj pruvas, ke la korespondaĵo diras la veron kaj la skribaĉantoj de « Internacia Kulturo » senskrupule kaj aĉe mensogas la mondsociopinion.

Vi, estimataj sinjoroj, vi respondu honeste (se povas esti honestaj) al la jenaj demandoj: kie estas la bulgaraj liberecanoj ? Kie estas ili, kiuj ĝis la 9-IX-1944 estis kun la anoj de la Komunista Partio kune en Balkano kiel partizanoj ?

Rakontu vi al la monda sociopinio kaj al la monda esperantistaro pro kiaj krimoj, politikaj aŭ aliaj, ili estas en diversaj koncentrtendaroj, kie ili senpage laboras kaj perforte, kiel bestojsklavoj! Rakontu vi ankaŭ pri la opoziciaj agantoj kaj opoziciuloj de la Agrikultur-Partio kaj Socialdemokrata (o.); kie estas ili ?

Diru vi pro kiaj kaŭzoj, krimoj ili estas en la koncentr-tendaroj kune la anarkistoj ? Kaj diru vi kie estas la libereco laŭ la laboristpartianoj (kom.)! Kaj, fine, kie estas la libereco por la agrikulturanoj, social-demokratianoj (o.), anarkistoj kaj aliaj antifaŝistoj, kiuj ne pensas kiel vi kaj kiel komunist-partianoj ! Certe. ĉiuj, kiuj ne pensas kiel vi kaj kiel komunist-partianoj estas reakciuloj kaj ĉio aliebla, tamen ne homoj honestaj batalantaj por justeco, bonstato kaj libereco !

Ne kantu vi laŭdan kanton al via gvidanto partia (führer) G. Dimitrov kaj al patrolanda fronto en esperanta gazeto, sed diru vi la veron *al nia bona kaj liboramanta popolo, kiu ĉiam estos dankema al ni kaj benos nin eterne.*

Vivu la libereco ! Vivu nia kara lingvo Esperanto ! For la mensoguloj ! For la tiranoj ! *VERO-JUSTECO*

